

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 4 2010 Vendredon la 3an de septembro 58a jaro

Kalendaro

(Ni komencas je la 19a horo. Kie? / Hvor? – vd. p. 4 / se s. 4)

Lundon la 6an de septembro(semajno / uke 36) – *mandag*

Usono – lando de feliĉo kaj mizero. Gerardo Tobias el Pollando laboris tie dek jarojn, ankaŭ informante pri Esperanto. Li spertis agrablajn aferojn, sed ankaŭ plurajn ege malagrablajn.

:

USA – et lykkens og ulykkens land. Gerardo Tobias fra Polen arbeidet der i ti år, og drev også med opplysning om esperanto. Han hadde hyggelige opplevelser der – men også flere svært uhyggelige.

Lundon la 20an de septembro (semajno / uke 38) – *mandag*

Al Oslo venos prezidanto (unu el la du) de la Svisa E-Asocio, Mireille (Mirejo) Grosjean, okaze de pac-seminario. Temo: Svislando – lando kun 3,5 lingvoj, kaj nun ankaŭ tiuj de la enmigrintoj. Kiu rolo por E-o?

Vi får besøk av Mireille Grosjean, den ene av de to lederne for esperantoforeningen i Sveits. Tema: landet med 3,5 språk – og nå også alle innvandrerne. Hvilken rolle kan esperanto spille i dette?

MERKREDon la 22an de septembro (semajno / uke 38) – *ONSdag*

Kromkunveno kun Mirejo. Ni invitos la publikon kaj buŝtradukos norvegen. Temo: Svislando: la riskoj de rekta demokratio.

Ekstramøte med Mireille Grosjean, åpent for publikum, med tolking til norsk,. Tema: Sveits – risikoene ved direkte demokrati.

Lundon la 4n de oktobro (semajno / uke 40) – *mandag*

Snorre Benum estas la sola Oslo-ano kiu iris al la UK ĉi-jare, en Havano. Li rakontos pri la evento kaj la lando.

Snorre Benum er den eneste fra Oslo som reiste til verdenskongressen i år – i Havana. Han forteller hvordan han opplevde kongressen og landet.

Lundon la 18an de oktobro (semajno / uke 42) – *mandag*

Ni preparos novan turisman broŝuron pri Oslo por la postkongreso en 2011.

Vi utformer en ny turistbrosjyre om Oslo for etterkongressen i 2011 (se s.4)

Ni ankaŭ atendas viziton de Drissa Diakite el Bamako, la ĉefurbo de Malio, (kie li estas UEA-deligito), eble iam en septembro. Tiam ni aranĝos kromkunvenon, kiun ni anoncos per retroŝto. Se vi ne havas retroŝton, bv. turnu vin al nia oficejo se vi volas ke ni tenu vin informita pri tiaj kromaranĝoj.

Kunvenejo ("Esperantonia") Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien; aŭ iru malsupren de Sinsen T (buso, metroo) aŭ de la haltejo Sinsenterrassen (tramo) laŭ la samnoma strato.

OkazIS

Lundon la 3an de majo Vikipedio. Ni denove trarigardis la jamajn artikolojn pri Oslo kaj la plurajn malnovajn broŝurojn en Esperanto el la 50aj jaroj, cele al revizio kaj ĝisdatigo de la tekstoj.

Lundon la 7an de junio. Ni interinformiĝis kaj diskutis pri praktikaj planoj.

Lundon la 21an de junio. La vizito de la afrika gasto prokrastiĝis ĝis pli poste en la somero. Ni parolis pri la internaciaj someraj aranĝoj kaj aliaj praktikaj planoj.

Ĵaŭdon la 1an de julio. Kromkunveno kun Kristin Tytgat, flandra lingvisto kiu laboras por EU en Bruselo, trejnante buŝtradukistoj. Ŝi rakontis pri tio kaj pri Belgio, lando kies du partojn kunligas nur reĝo, futbalo kaj la granda ŝtata ŝuldo. Ĝenerale flandroj kaj valonoj simple ne interkontaktas kaj ne interesiĝas unuj pri la aliaj, sed kaŭzas problemojn la ĉefurbo, kiu estas franca insulo en Flandrio – kaj glutas najbarajn flandrajn komunumojn. (Pri Belgio vd. artikolon en la nova numero de *La Ondo* (7, p. 15).)

Venis malmultaj eksterlandaj gastoj ĉi-somere

Tamen estis kelkaj:

- Ni aranĝis kromkunvenon kun Kristin Tytgat el EU/Bruselo 1. julio, sed ŝi ne uzis Pasportan Servon.
- Du junaj gefrancoj tranoktis ĉe Leif Arne en Sinsen, kaj vizitis la klubejon.
- Kjell Peder havis gastojn el Pollando hejme en Rælingen plurajn semajnojn.
- kaj Gerardo Tobias, kursgvidanto kaj ĝenerala helpanto en la kursejo en Lesjöfors, restis pli ol monaton, i.a. ordigante plurajn necesajn riparojn en Esperantonia.

Pliaj bibliotekaj libroj al Esperantonia

De post 1993 la bibliotekaj libroj de NEL staris en magazeno en la biblioteka domo en Hamar. Nun oni petis nin liberigi tiujn bretarojn por aliaj celoj. Unu ekzempleron de ĉiu libro akceptas la deponejo de la Nacia Biblioteko en Mo i Rana, sed ĉi dek bretometrojn da duoblaĵoj ni devos iel surbretigi en Oslo, manke de alia stokejo. Ni kunigos ilin kun la jama kluba libraro (en kiu jam estas multaj duoblaĵoj el la biblioteko de NEL).

En Rana la libr(et)oj estos – kun la tempo – registritaj, kaj tial serĉeblaj, danke al tio, ke NEL havas membron (Hilde Dahlberg) inter la dungitoj.

Tamen kelkajn valorajn kaj aktualajn librojn ni ne forsendas al la Nacia Biblioteko, kvankam ni havas nur unu ekzempleron, sed konservas ilin por uzado de la membroj. Temas i.a. pri:

Trezoro (novelaro, 2 volumoj da , binditaj)
Marjorie Boulton *Faktoj kaj fantazioj*
Bildvortaro (Eichholz)
Cherpillod: *Ne-PIVaj vortoj; Ekzotikaj vortoj*
Ĝivoje: *Esperantonimoj* (homonimoj, sinonimoj)
Gregor: *La fontoj de Esperanto*
Stefan Maul: *Vortaj (a)ludoj*

Har du lagringsplass hjemme?

Vi har i kjelleren her boklageret fra Esperantoforlaget, nå overtatt av klubben vår. Mye av dette er ikke ting som behøver å ligge akkurat her. Hvis noen kunne lagre noe av det hjemme, ville det frigjøre plass som trengs til mer aktuelle ting (f.eks. deler av Forbundets bibliotek, som snart må flyttes fra magasinet i Hamar bibliotek, vd. ĉi-supre. Si fra til kontoret hvis du tror du har mulighet for å hjelpe.

Nova anstataŭanta membro por la domkomisiono?

Post la demisio de Cato Haugen el la domkomisiono, la anstataŭanto, Kjell Peder Hoff, iĝis la kluba reprezentanto tie, kaj sekve mankas anstataŭanto. Unue ni pensis ke devus esti (almenaŭ unu) ina membro en la domkomisiono, sed malmultas niaj (aktivaj) inaj membroj kaj ni ne trovis iun pretan. Do tiu posteno provizore vakas. Kiu – ino aŭ malino – interesiĝas?

Hvem vil representere klubben vår i huskomiteen?

Postkongreso en Oslo 2011?

Kelkaj klubanoj komencis plani tri-tagan turisman postkongreson en Oslo post la Universala Kongreso en Kopenhago venontjare. Se vi interesiĝas helpi, bv. turni vin al Cato Haugen <[pluto8008\[at\]gmail.com](mailto:pluto8008[at]gmail.com)> tel. 22 30 05 58, poŝ. [452 88 435](tel:45288435).

Alekstera agado

Ĉi-somere ni starigis informbudon en la foiro *Husebydagene* en Skedsmo kaj en la Mela-festivalo sur la urbodoma placo (*Rådhusplassen*) en Oslo.

Ni devas trovi pli da tiaj foiroj kaj festivaloj, kie ni povos starigi informbudon. Bv. averti nin se vi scias aŭ aŭdos pri io tia.

Ni ankaŭ starigis nian libroekspozicieron en kelkaj bibliotekoj en Malsupra Romerike.

Eŭropa tago de lingvoj – dimanĉon la 26. septembro

En la antaŭa tago, sabaton, ekde tagmezo ni starigos informbudon ekster nia pordo sur la trotuaro, por konatigi nin al niaj divers-devenaj najbaroj.

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – *leie møterom?*

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for en eller flere kvelder? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.

La klubo vendas librojn, insignojn, glumarkojn

Ni vendas i.a. ruĝajn glumarkojn (4 x 7 cm), por valizo, (dorso)sako, teko po 2 kronoj; kaj diversajn insignojn / *jakkemerker* (verda stelo).

Eraro en *Kluba Bulteno 3* (p 3)

La dato de la eksterordinara ĝenerala kunveno estis lundo la 19a de aprilo (ne la 15a de marto).

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94
www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: <[oficejo\[at\]esperanto.no](mailto:oficejo[at]esperanto.no)>
Poŝtĝiro 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).